



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

30-jara; n-ro 7/8-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

FERVORULOJ, ATENTU!

En la lasta jarkunveno de nia Asocio mi atentigis la ĉeestantojn pri la „C-kurso” por geinstruistoj, kiu okazos ĉe la Komunuma Seminario por Geinstruistoj de Amsterdam, se sufiĉe da personoj aliĝos. Tiaj C-kursoj okazas en vesperaj horoj por prepari por la oficialaj ekzamenoj por la L.O.-diplomoj.

Ĉar nun estas kreita oficiala L.O.-diplomo „Esperanto”, la direktoro de la supre nomita seminario, ĉe kiu mi funkcias kiel profesoro de Esperanto de post 1955, konsentis okazigi ankaŭ Esperanto-kurson dum la nuna instru-jaro. Post multe da klopodoj ni sukcesis starigi la kurson en la pasinta aŭtuno.

Ĝia graveco estas tre granda. Ne nur ĉar ĝi estas la unua C-kurso de Esperanto, sed ankaŭ ĉar ĝi estas uzebla kiel argumento por starigi similajn kursojn en aliaj seminarioj.

Tial estas necese, ke ankaŭ la dua kurso kiu estas planita por la venontaj du jaroj povu komenciĝi en la venonta septembro.

La instruistaro ne estas sufiĉe informita pri la eduka valoro de nia lingvo kaj ankaŭ ne pri la diversaj aliaj utiligoj kaj utiloj.

Mi alvokas ĉiujn legantojn de „Nederlanda Esperantisto” kaj precipe la gvidantojn de la LEEN-sekcioj kunlabori por la sukcesigo de niaj klopodoj.

Instigu kaj igu instigi geinstruistojn kapti la nunan okazon por serioze studi Esper-

anton por akiri la novan diplomon. Tio malfermos al ili novajn horizontojn kaj eble donos novajn eblajojn en la profesia laboro.

Ne ĉiu aprobanto de Esperanto estos preta dediĉi multe da tempo al serioza studado. Sed inter la geinstruistoj certe troviĝas multe da studemuloj. Ege eta parteto de ili sufiĉus por okazigi en *diversaj* seminarioj C-kursojn de Esperanto. Sed tiuj studemuloj ne estas atentigataj ĝustatempe pri ĉi tiu eblaĵo.

Mi petas la helpon de ĉiu celkonscia samideano - ne nur el Amsterdam! - por atingi ĉi-jare imponan sukceson, por ke la skabeno de instruado de la ĉefurbo vidu, ke la interesiĝo pri la internacia lingvo estas reala kaj ke ne temas nur pri unu el la multaj kursoj kiuj estas aranĝataj kun la minimuma nombro da partoprenantoj.

Aliĝilojn oni povas ricevi de la „Gemeentelijke Kweekschool voor onderwijzers en onderwijzeressen, Nieuwe Prinsengracht 89, Amsterdam (C).

Mi persone volonte donos ĉiujn deziratajn informojn.

Certe estas bone ke mi jam nun atentigu pri grava detalo: la kompetentaj instancoj repagos al la partoprenantoj la duonon de ĉiuj studkostoj, al tiuj kiuj venos el aliaj lokoj ankaŭ la vojaĝkostojn.

Oni bonvole informu min pri la interesigitaj personoj, por ke mi povu inviti ilin komence de septembro al la kunveno en

ASOCIAJ INFORMOJ.

Propagando.

Laŭ decido de la jarkunveno je 2-5-'65 la ĉefestraro donacis el la Mabesoone-fondaĵo *gld. 150*,— por propaganda celo al nia sekcio „Merkurio”, Rotterdam, kiu petis subvencion de *gld. 200*,—.

Se oni petas monon por propagandi en la sekcia regiono, bonvolu sendi sufiĉe detalajn kaj taŭgajn budĝeton kaj planon al la sekretariino.

Teatra servo.

La adreso de la teatra servo de L.E.E.N. nun estas:

S-ro B. R. Beekhuysen,
Noorsestraat 17,
Delfzijl.

Sekcioj, kiuj bezonas teatraĵojn aŭ skeĉojn por ludi en la klubkunvenoj, bonvolu kontakti kun nia ĉefestraro s-ro Beekhuysen.

Malsano de s-ro S. S. de Jong.

Kiel ni jam mallonge povis sciigi en la junia numero de „N.E.”, nia kunlaboranto en „N.E.” s-ro S. S. de Jong el Tjerkwerd, malsaniĝis. Niaj legantoj do dum certa tempo ne povos trovi en nia organo liajn artikolojn pri „Lingvaj Problemoj”. Tie ĉi ni direktas al li, certe ankaŭ el la nomo de la fidelaj gelernantoj de liaj kontribuajoj, niajn plej bonajn dezirojn por resaniĝo.

H. G.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Merkurio, Rotterdam.

Sekr.: Wm. Nagellaan 16.

Sabaton la 12-an de junio sekcio „Merkurio” Rotterdam aranĝis budon en la semajna ĝenerala merkato en Rotterdam kun la surskribo:

„1965 Jaar van Internationale Samenwerking, Jaar van de Internationale Taal ESPERANTO”.

kiu ni interkonsente decidis pri la kurs-tago (ĉu en iu vespero, ĉu en merkredo posttagmeze, ĉu -eĉ- je sabata mateno). Mi liberigos min por tiu tago, kiun la plimulto preferos, por ebligi laŭeble grandan sukceson.

S. PRAGANO,
Willemsparkweg 38 boven, Amsterdam-Z

Centoj da homoj vizitis tiun merkaton kaj multegaj haltis antaŭ la budo, kie allogis multaj esperantaĵoj, kiel libroj, faldfolioj, gazetoj, gramofondiskoj k.t.p. kaj la publiko montris grandan interesigon. Ankaŭ enkadrata kolekto da interesaj korespondajoj kaptis multajn scivolulojn.

Por kolektantoj estis Esperanto glasoj, pingloj, alumetskatoloj, sukursaketoj k.t.p., ĉiuj objektoj bone venditaj.

Merkurio kaptis la okazon (kiel celita) post kelkaj informoj subskribigi la peticion al la Unuiĝintaj Nacioj de multaj homoj.

Oni disdonis proks. 500 informilojn kun aro da plej aktualaj kaj interesaj faktoj pri Esperanto kaj kelkajn centojn de la faldfolio „De wereld wordt hoe langer hoe kleiner”.

Estis interesataj ankaŭ multaj eksterlandanoj, ĉu laborante, ĉu feriante en Rotterdam. Eĉ turisto el Melbourne (ne-esperantisto) notis la adreson de la Melbourne Esperanto klubo por ĉe hejmenreveno tuj preni kontakton.

Tiel „irante inter la publiko” oni atingis multajn homojn, kiuj sciis ĉu malmulte, ĉu nenion pri Esperanto kaj por kiuj Esperanto nun fariĝis io vivanta. Rimarkinde estis ke multaj gejunuloj montris interesigon.

Estis plensukcesa aranĝo. Speciale instigaj demandoj por la deĵorantoj estis: „Ĉu estonte vi staros ĉi tie ĉiun semajnon?” kaj „Ĉu vi venos ankaŭ en nia merkato?” (Maassluis) kaj „Ĉu vi venos ankaŭ en la merkato en Dordrecht?”

Merkurio intencas post unu, du semajnoj ripeti la agadon kaj ankoraŭ kelkfoje poste.

* *
*

Poŝlibra Esperanta Vortaro. La konata eldonejo „Prisma” intencas eldoni bonan kaj nemultekostan Esperanto-vortaron. Ĝi mem petis pri manuskripto kaj nun intertraktas kun s-ro Isbrücker. La vortaro aperos en la „Aula”serio.

L.O.-AKTE ESPERANTO.

Het schriftelijke gedeelte van het examen zal worden gehouden in de maand september, het mondelinge tegen het einde van de maand oktober.

Esperanto por blinduloj.

La „Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj” (Nosobe) ricevis konsiderindan helpon de du instancoj: la dumonatan organon „La Kontakto” ekde la 1-a de januaro 1965 eldonas „Ned. Blindenbibliotheek” en Hago, kiu jam delonge prizorgas la brajlan preson. La financa ŝarĝo por Nosobe nun grave malpliĝis. Due, la ĉiumonata sonbenda informilo estas prizorgata de „Tanna Wilhelmina Bruijnzeelstichting” en Rotterdam, kiu fondaĵo bonege estas instalita por plioblighi sonbendojn. Redaktoro estas s-ro D. E. Schipper el Hilversum.

Vastan laborteronon por la kultura kaj scienca evoluo de la blinduloj trovis la brajlaj bibliotekoj ankaŭ en la dispruntado de sonbendaj verkoj, grave ankaŭ por aĝe blindiĝintaj homoj, kiuj ne plu kapablas lerni la brajlan skribon.

Jam dum seso da jaroj la „Le Sage ten Broek-biblioteko” en Grave starigas sufiĉe grandan fakon en esperantaj verkoj, kun legantoj en la tuta mondo. Gojige estas, ke nun ankaŭ la nederlanda blindulbiblioteko en Hago (adr.: Noordwal 7) komencis starigi esperantan fakon de sonlibroj. La unuaj tie aperintaj verkoj estas: Al Torento, kaj: Infanoj de Torento, ambaŭ de Stellan Engholm.

Sekretaria adreso de Nosobe: s-ro G. Lap, Turkse Tuin 3, Rotterdam-26.

* *
*

SYLLABUS ESPERANTO.

In de serie „Wetten en bestuursmaatregelen O.K. en W. is onder no. 41 verschenen „EXAMENBESLUIT LAGER ONDERWIJS ESPERANTO”; hierin zijn opgenomen:

1. het Koninklijk besluit van 23 december 1964, Staatsblad 574, tot vaststelling van het Examenbesluit lager onderwijs Esperanto;
2. het programma voor het examen ter verkrijging van de akte van bekwaamheid voor het geven van lager onderwijs in het vak Esperanto;
3. de Toelichting op het examenprogramma;
4. Syllabus voor het examen ter verkrijging van de akte van bekwaamheid voor het geven van lager onderwijs in het vak Esperanto. In deze Syllabus worden enkele aanbevelingen gedaan voor studerende voor de L.O.-Akte Esperanto. Verder is een lijst opgenomen van de woordsoorten en zinsdelen in de Esperanto-vertaling.

Studerenden voor de L.O.-Akte Esperanto raden wij dringend aan een exemplaar te bestellen. Prijs f 0,80. U kunt f 0,95 overschrijven op postgirorek. no. 674852 van de Adm. Stichting „Esperanto bij het Onderwijs, waarna het franko zal worden toegezonden.

De Syllabus is ook verkrijgbaar bij het Staatsdrukkerij- en Uitgeversbedrijf, Chr. Plantijnstraat, Den Haag.

Examencommissie L.O.-akte Esperanto benoemd

De Staatssecretaris van Onderwijs en Wetenschappen heeft thans de commissie, die in het jaar 1965 zal zijn belast met het afnemen van de examens ter verkrijging van de akte van bekwaamheid voor het geven van lager onderwijs in het vak Esperanto, ingesteld.

In die commissie heeft de Staatssecretaris benoemd:

de heer H. A. de Hoog, Archimedesweg 68, Amsterdam (lid en voorzitter)
de heer F. Goedhart, Fazantenlaan 8, Zeist (lid en secretaris)
de heer dr. W. J. A. Manders, Karel van Egmondstraat 47, Venlo (lid)
de heer Mr. S. Pragano, Willemsparkweg 38 bvn., Amsterdam (lid)
de heer W. Grolleman, Raketpad 14, Arnhem (lid)
mevrouw Drs. A. Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum (lid)
de heer J. U. Hommes, Koning Lodewijklaan 8, Apeldoorn (lid).

Rezervu la 24-an ĝis la 26-a de septembro 1965 por Nia Jubilea Kongreso.

VIDU LA PROGRAMON EN LA JUNIA NUMERO
KAJ LA ALIĜILON EN LA APRILA NUMERO.

Bonvolu ensendi vian aliĝilon kiel eble plej baldaŭ.

La Komitato.

KVIKKE HO'DER!

Kvikke Ho'der! Ne ektimu, kara leganto. Jen ne la lasta neologismo, sed nomo: nomo de ludo. Dana nomo por dana ludo! Kion ĝi signifas? Nu, ĝi signifas: Vigla Cerbo! La danoj havas viglan cerbon. Kaj la danaj esperantistoj havas ne nur viglan cerbon, sed ili havas ankaŭ la ludon „Vigla Cerbo”. Same kiel ni en niaj kluboj kelkfoje la ludon „Kvizo”, ili havas la „Viglan Cerbon”, sed ne foje-foje. Ne, tute organizite.

En unu el la numeroj de „Dansk Esperanto-Blad” mi legis pri ĝi kaj mi petis informojn. Mi eksciis, ke „Kvikke Ho'der” por ili estas ne nur ludo, sed ankaŭ batalo. Paca batalo, kompreneble. Ĉu vi atendas ion alian de esperantistoj? Kaj fine ne nur batalo, sed festo. Komuna festo de esperantistoj en tiu urbo, kie okazas luda batalo.

La iniciatintoj invitas ĉiun klubon partopreni laŭ la jena plano: Ĉiu klubo elektu inter siaj membroj 3 aŭ 4 anojn, kiuj reprezentu la klubon.

La lando estas dividita en regionojn. La kluboj sendas siajn reprezentantojn al elektita urbo. En tiu la regionaj kluboj „batalas” unuj kontraŭ aliaj en paca konkurso. Tiu komuna aranĝo devas esti vera Esperanto-festo kun muziko, kantoj k.t.p. Dum la festo la reprezentantoj de la diversaj kluboj konkuras laŭ la ideo de „Kvikke Ho'der”.

La gajnintaj kluboj poste renkontiĝas por denove „batali”. Kompreneble dum festa aranĝo. Fine la du laste gajnintaj kluboj devas konkursi por la fina venko, dum . . . kompreneble: festo!

La gajninta klubo de la tuta lando ricevas Esperantan standardon, kiun ĝi eventuale devos transdoni al la gajnonto de la venonta jaro. Kiu dum 3 sekvantaj jaroj aŭ entute 5 fojojn gajnis, rajtas posedi definitive la standardon. Sur la standardo

estas stebitaj la nomoj de la gajnintaj kluboj. En Danujo oni nun jam dum 4 jaroj aranĝis tiun ĉi konkurson.

Evidente ili multe amuziĝas per ĝi kaj la celo, plivigli la vivon en la kluboj, estas certe atingita.

La taskoj por la ludo estas kompilitaj de neŭtrala instanco, ekz. la estraro. La kluboj ricevas ilin samtempe en la komenco de la batalo.

En la diversaj distriktoj ĝi do devas okazi je la sama vespero. La temoj estas ne nur sur la esperantista kampo, sed konsistas el diversaj rubrikoj. Ekzemple ekzistas demandoj pri historio, geografio, muziko k.t.p. Kaj . . . , diris miaj danaj amikoj, ili estu ne tro malfacilaj! Devas esti ludo kaj kaŭzo de agrabla kunesto!

Kaj nun grava demando. Ĉu tiaj ludoj povos esti io por ni? Kial ankaŭ ni ne arangu, ekzemple en la venonta vintro, saman ludon, batalon aŭ konkurson? Ne gravas la nomo. Plej gravas, ke ni agrabligas niajn klubvesperojn. Ne restu izolitaj niaj kluboj. Ni havu agrablajn kontaktojn!

Kaj . . . ĉu la batalo devos fini ĉe la limoj? Ĉu vi scias, kion miaj danoj amikoj diris post la ekspliko?

„La gajnintaj kluboj de ambaŭ landoj poste konkuru inter si”!

Kompreneble dum komuna festo! Ĉu ne grandioze?

Kiu klubo sendos siajn reagojn al la ĉefestraro?

R. S.

Manuskriptojn, prefere unuflanke tajpitajn kun larĝa marĝeno, por la septembra numero de „N.E.” ni akceptas ĝis la 10-a de aŭgusto.

La Redaktoro.

PAROLAS LA LEGANTOJ.

KRITIKINDA KRITIKO.

La artikolo „Ĉu eraroj aŭ ne?” de s-ro De Jong en la maja numero de N.E. kaptis miajn interesiĝon kaj plenan aprobon, ĉar la aŭtoro tuŝis en ĝi du gravajn faktojn pri kiuj oni ĝenerale ne sufiĉe atentis:

Unue, vere ekzistas en Esperanto pluraj gramatikaj formoj pri kiuj gramatikistoj diversmaniere povas kaj rajtas opini; kion unu konsideras erara, tio estas laŭ alia nepre korekta. Ne ekzistas regulo malpermesanta skribi formon kiun alia malaprobas, kondiĉe ke oni ne transiru la limojn fiksitajn en la gramatiko, kiu lasas sufiĉe da spaco por personaj preferoj. Sed oni agu konsekvence, do ne uzante jen unu, jen alian, kontraŭan formon; tio pruvus mankon de principo.

En recenzoj oni rajtas atentigi pri specialaj formoj uzitaj de iu aŭtoro, sed oni nepre respektu ties lingvajn konsiderojn, ne nomante erara tion, en kio eble nur la recenzanto vidas eraron aŭ . . . kion li mem ne komprenas.

Per la antaŭa alineo mi jam tuŝis la duan fakton, montritan de s-ro De Jong: ne ĉiu recenzanto estas sufiĉe kompetenta por sia tasko. Kelkaj serĉas erarojn kie ili ne estas, verŝajne nur por havi almenaŭ ion kritikeblan; aliaj metas personajn preferojn kontraŭ tiujn de l' aŭtoro. Tiuj ne agnoskas la ekziston de diversaj neplene solvitaj lingvaj reguloj. Kaj dume ili facile forgesas, ke en sia kritiko ili mem povas peki kontraŭ lingvaj reguloj. Ĉiu homo povas erari; tial ĝuste recenzisto bone atentu siajn proprajn vortojn!

Ke recenzanto ignoras lingvajn problemojn, aŭ estas nekompetenta por juĝi pri ili, iam pravis al mi i.a. recenzo en la sama gazeto menciita de s-ro De Jong, kie mi legis, ke la aŭtoro de la recenzita verko nekonsekvence uzis diversajn modojn post la konjunkcio *kvazaŭ*. Per tiu neprudenta atentigo la recenzanto pravis, ke li neniam scias pri la fakto, ke ne ĉiu aŭtoro sklave akceptas la regulon diktitan de „Plena Gramatiko”; ke *kvazaŭ* postulas nur la kondicionalon. La tradukinto de la verko uzis laŭsence ankaŭ prezencon aŭ preteriton.

Tial do mi plene samopinias kiel s-ro De Jong.

G. J. Degenkamp.

Sukceso por Skolta Esperantista Ligo.

La lastan tagon de 1964 alvenis letero ĉe s-ro J. van Gulck, prezidanto de SEL de 1952 ĝis 1965. La leteron sendis Maj. Gen. D. C. Spry, direktoro de la Monda Skolta Oficejo. Ĝi tekstis: „Je la kunveno de la Monda Komitato en Luksemburgo en septembro 1964, la demando pri Esperanto inter skoltoj estis pritraktita. La Komitato pritraktis tiun demandon lastfoje en 1934, kaj resolucis jene: „La Komitato ne aprobas studon de Esperanto inter skoltoj, konsiderante tion de malgranda praktika valoro”.

Je la nova kunveno la Komitato konsentis pri jena eldiro, kiun mi kun ĝojo transsendas al vi: „Esperanto . . . pruvis sian utilon en multaj sferoj kaj en kelkaj Skoltaj Asocioj estas permesata por la Interpretista Insigo. La Komitato decidis nuligi la resolucion de 1934, sed fari neniu alian paŝon”.

En la duonjara raporto de SEL le ĝenerala sekretario, s-ro J. K. Hammer, diras ke tiu nura konstato ankoraŭ ne estas tre favora, sed ĝi donis la eblecon kunlabori kun kelkaj naciaj skoltasocioj.

Skoltaj legantoj kiuj interesiĝas pri SEL povas ricevi informojn ĉe s-ro J. K. Hammer, Wibautstraat 49, ZAANDAM.

KORESPONDPETOJ.

Pola studento Henryk Ebert, Lowicka 22, BYDGOSZCZ, Pollando, dez. kor. Interŝ. kol. bildk. kaj gramof.disk.

Lycyna Stnebanska, ul. Dubrówski 4/1, KRAKAW 14, POLUJO, kaj Irena Szlachta, ul. Rynek Podgórski 7/5a, KRAKAW 14, Polujo, lernantinoj de mezlernejo, dez. kor. Interŝ. il. bk. kaj pm.

18-jara studento dez. kor. kun gestudentoj pri sciencaj problemoj, filatelio, bildk. Adreso: Vladimir Pedkiw, str. Pieniny 18/5, LODZ 22, Polujo.

S-ro Ladislaŭo Maróthy, BUDAPEST IX, Csarnok tér 3-4, Hungarujo, kolektas informojn pri „ranohomo-movado”.

S-ro Szalay Sandor, Auróra utca 39, BUDAPEST VIII, Hungarujo, interŝ. il. pk. el la tuta mondo.

S-ro Vladimír Folytnek, apotekisto, MALACKY 1071, Ĉeĥoslovakujo, serĉas nedl. kor. Komence presliteran adreson.

TRA LA LIBRARO.

„JARLIBRO DE U.E.A., 1965, unua parto. Eldonis Universala Esperanto Asocio. Rotterdam. Formata 11½ x 15½ cm., 625 paĝoj kun 15 blankaj por notoj.

Denove la jarlibro kreskis laŭ volumo kaj enhavo. Trafoliumante ĝin oni fantaziu foje kiel nova Esperantisto, ankoraŭ ne scianta pri la agadoj de U.E.A. rigardus la libron. Scivole li turnas la paĝojn, jen ciferoj kaptas lian atenton (ĉu nur 39000 personoj estas organizitaj?), jen fotoj de la Estraro (interese ekkoni ilin), jen la grandaj listoj de komitatanoj akademianoj, dumvivaj membroj, denaskaj Esperantistoj (jam tiom!) kaj fine tiun de la Delegitoj. Kun miro li konstatas, ke malgrandaj landoj, kiel la nia, havas vastan delegitan reton, dum Ĉinujo kun sia preskaŭ 700 milionoj da enloĝantoj havas . . . unu. Fine li atingas la libro-listojn, la novajn eldonojn.

Kion li farus post la foliumado? Pli detale legi kaj relegi! Konstatu, ke Esperanto jam forte enradikiĝis en la mondo, ke U.E.A. estas impona organizaĵo kaj fine li decidu nepre aliĝi al ĝi kiel Membro-Abonanto, konsiderante ke li eble poste povos fariĝi Dumviva Membro . . .

R. S.

Petr. Bezruč (1867-1958). Eld. Památník Petra Bezruče (Memordomo de P.B.), OPAVA, Ĉeĥoslovakujo, 1965. 16 p. 15 x 21 cm., il.

Tiu ĉi grafike elstara libreto enhavas biografion de la ĉeĥa poeto, bibliografion de la Esperanto-tradukoj de lia verkaro kaj tradukojn de 5 poemoj. La tradukoj estas de R. Hromada kaj J. Korinek.

MONDA KULTURO, vintro 1965. Sub red. de Andreo Albault. Eld. U.E.A. Jarabono gld. 15,—.

La unua artikolo en la lasta numero de „Monda Kulturo” estas prelego farita de prof. Régulo Pérez en la lasta ISU en Hago pri la antaŭaj loĝantoj de la Kanariaj Insuloj kaj ilia lingvo. Interesa historio.

Streĉan kaj emocian fragmenton „Homo alfrontas la morton” el romano de Iris Murdoch tradukis Marjorie Boulton. Ĝi prezentas ordinaran okazaĵon kun neordinara psikologia efiko.

Artikolo pri la granda hispana filosofo kaj romanverkisto Miguel de Unamuno memorigas lian centjaran naskiĝdaton.

Ankaŭ el la hispana kultursfero estas artikolo pri la socia bildo montrata de la hispanamerika romano.

Tre interesa estas artikolo de N. Z. Maimon pri la pseŭdonimoj de Zamenhof (D-ro Esperanto, Homo Sum. Anna R., Unuel, k.t.p.) kaj ilia klarigo laŭ sociaj kaj psikologiaj cirkonstancoj.

En MK spaguliĝas diverseco de kulturoj. Ĝi tiel reprezentas nian internacian kulturon kaj estas nepre aboninda kaj leginda. La nivelo estas konstante alta. Tamen ĝenas la leganton, ke multaj vortoj, malgraŭ entuziasma glosado, restas neklarigitaj. Estas demando, ĉu vortoj kiel „ŭesto”, „estiel”, „zelo”, estas vere necesaj.

R. G.

KAŬKAZAJ RAKONTOJ, de M. J. Lermontov. El la rusa tradukis S. Staritsky. Eld. U.E.A., Rotterdam, 1964. 72. p. 21 x 15 cm. Prezo: 5 gld. (20 st.).

Miĥael Jurjewiĉ Lermontov (1814-1841), rusa poeto kaj romanverkisto, estis studento en la Moskva universitato kaj de 1832 ĝis 1834 li vizitis la kavalerian lernejon en Petersburgo. Pro akra poemo „Al morto de Puŝkin”, direktita kontraŭ la kortega grupaĉo de Nikolao I, li estis sendita en regimenton, batalantan en Kaŭkazo. Li revenis en 1837, sed en 1840 li denove estis sendita en ekzilon al Kaŭkazo, kie li en 1841 mortis en duelo. Plej fama Lermontov iĝis pro sia romano „Heroo de nia tempo”. Ĝi estas la unua psikologia romano en Rusujo, kaj oni povas samtempe nomi ĝin la unua provo en Rusujo de socia romano: la verkinto kritikis la socion, el kiu povis naskiĝi „heroo” kiel Peĉorin: Byron-a romantikulo egoisma, maltrankviliga, kaŭzante malfeliĉon al siaj kunuloj, samtempe vere heroeca, aŭdaca, laca pri la vivo kaj krociĝinta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

El tiu romano tri rakontoj kolektiĝis en „Kaŭkazaj Rakontoj”. Mi seninterrompe legis ilin kun streĉa atento. La mirinda rakontarto tuj kondukas nin al la tiam ankoraŭ nur duonkoloniigita Kaŭkazo, kies sferon la verkinto bele scias elvoki. La verko estas eldonita okaze de la ĉie festita 150-a naskiĝdatreveno de Lermontov.

Instrua „Antaŭparalo” de B. Tornado informas nin pri la vivo de la verkisto kaj pri jam aperintaj Esperanto-tradukoj de liaj verkoj.

Pri la lasta ankoraŭ pli detale informas nin la plena bibliografio de tradukoj de Lermontovaj verkoj en Esperanto en la fino de la verko.

H. G.

EL LA VIVO DE LUDOVIKO ZAMENHOF de Gösta Hendriksson. Legolibreto por novaj esperantistoj. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Malmö. Formata 12½ x 18 cm., 16 paĝoj. Prezo kart. f 2,75, broŝ. f 2,—. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N.

La verketo koncize skizas la junaĝajn jarojn de la kreinto de esperanto ĝis la publikigo de la unua libreto. Ĉar destinita por novaj (junaj) esperantistoj la lingvo ĝenerale estas facila. Kvankam modesta la enhavo donas sufiĉe klaran bildon pri Zamenhof kaj tial la libreto estas rekomendinda. Alia demando estas ĉu la aperigo estis necesa, se multaj lernolibroj ofte donas historiajn faktojn pri la aŭtoro de esperanto. La kompilinto laŭ la titolpaĝo kompilis la enhavon el diversaj fontoj, sed certe li ne studis la verkon „Leteroj de Zamenhof I” aŭ la Memorlibron pri la Zamenhof-jaro. Tie li legos ke Zamenhof abomenis la „titolon” *Majstro*, kiu estis al li tre malagrabla.

Kial do denove uzi tiun vorton?

P. M.

„KIEL ESTI AMATA”, de Kazimierz Brandys. El la pola tradukita de Jerzy Grum. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio, Nowy Swiat 27. 1964. 65 pĝ. 20 x 12 cm., ilustrita. Prezo: gld. 1,50 (6 st.).

Modernstila prozaĵo en formo de interna monologo de virino dum flugvojaĝo inter Varsovio kaj Parizo. „Kiel esti amata” servus por realigo de filmo sub la sama titolo.

RIMARKINDA VERKO

„Libro de Amo” *)

En 1932 aperis en Esperanto libro, kiu ŝokegis la legantaron. La titolo estis „Sekretaj Sonetoj”, verkitaj de iu Peter Peneter. La sonetoj prikantis la seksan amon inter viro kaj virino de la piedfingroj ĝis la kranio de ilia korpo kaj se oni prikonsideras, ke en tiu tempo trankvila verko kiel „Lady Chatterley’s Lover” ne povis esti legata de sinjorino en tramo aŭ vagonaro, estas facile imageble, ke la ŝtormo ĉirkaŭ la poezio de Peter Peneter kreskis ĝis skandalo. Jaroj pasis kaj kvankam la stoko estis elĉerpita, rea eldono bedaŭrinde ne okazis. Kiam mi legis en la biografiaj detaloj de „Esperanta Antologio”, ĝi nome enhavas du erojn el la soneta ciklo, ke Peneter mortis en 1952, mi perdis la esperon iam vidi represon de la sonetoj. Sed jen en 1964 aperis republikigado. Amiko de la aŭtoro, kies adresoj troviĝas sub ĉi tiu artikolo, finance ebligis tion. Oni kontinuus ankoraŭ la mistifikadon, eĉ pliigis ĝin, ĉar krom la sonetoj troviĝas en la libro dua volumo, verkita de iu Georgo Peneter, filo de Peter. Li produktis versaĵojn sur la sama erotika tereno, sed laŭ la enkondukaj vortoj ankaŭ tiu filo mortis. Malgraŭ tiu komplika ŝanĝado de nomoj mi centprocente ĝojas, ke la poemaro denove estas akirebla kaj pro la fakto, ke la esperanta literaturo ricevas tre malmultan, kaj verŝajne „Libro de Amo” pro sia delikata karaktero tute nenian, propagandlumon, mi speciale ŝovas la libron sub vian atenton.

Ne por literature recenzi la poezion sed por substreki la gravecon de tiu verko. En la unua loko la libro povas apenaŭ manki al la librejo de bona Esperantisto, ĉar ĝi enhavas sur la tereno de la seksaj interrilatoj, vortojn kaj esprimojn, kiuj senescepte ekzistas en la modernaj lingvoj kaj kiuj ankaŭ por Esperanto estas nepre necesaj. Ĉar la kunestado de la

PROPAGANDO KOSTAS MULTE DA MONO,

TIAL SUBTENU LA MABESOONE-FONDAJON !

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamingel 294, Groningen.

Poŝtĝironto: 81 58 89.

esperanta popolo ĉefe nur okazas dum kongresoj, ĉi tiuj aranĝoj, kaj precipe la junulaj, estas la naturaj krecentroj de vortoj koncerne la seksan interrilatadon. Tamen la firmigo kaj transdonado de tiu vorttrezoro plene fike nur eblas per skribaj tekstoj. „Libro de Amo” estas tial grava, ĉar ĝi kiel perfekta idioma lernolibro donas la nekutimajn aŭ novajn vortojn en ekzemploj, la poemoj, kaj poste ili estas serĉeblaj en du glosaroj, kiuj estas prikonsiderendaj kiel aldonoj al la Plena Vortaro.

Krom tiu fakterminara aspekto, kiu certe estas larĝscale interesa, ĉar ĉiuj amantoj havas tiun fakon, la libro estas unika el literatura vidpunkto. Unu flanko de nia literaturo estas pli malpli plenkreska, nome la poezia. Sed sonetojn oni ne tiel ofte renkontas en ĝi, pretervidante la sennombrajn duonnaskitaĵojn. La kvindekdu sonetoj de Peter Peneter signifas mejloŝtonon en nia poezio. Ili formas la unuan sonetan ciklon, modelan laŭ ritmo kaj rimo, altnivelan laŭ lingva uzado. Kaj precipe tiu majstrecio en la prilaboro de la lingvo kaj la povo konsekvence obei al la severaj neeviteblaj postuloj de la soneto klare montras al esoterulo, kiun verkiston maskas la pseŭdonimo Peter aŭ Georgo Peneter.

La reagoj post la unua eldono de la „Sekretaj Sonetoj” pruvis, ke la tiamaj Esperantistoj havis tute unuflankan perspektivon al kaj malkompletan ideon pri sia literaturo. Evidentiĝis, ke sonetoj tiaspecaj ne estis akcepteblaj. Nun en 1965 tiu opinio estas alia. Verŝajne kunhelpis faktoroj eksteresperantaj, kiel la ĝenerala intensigo de seksaj temoj en artaj kreaĵoj. En Esperanto mem publikigaĵoj kiel ekz. „La Infana Raso” glatis la vojon al verkoj kiel „Libro de Amo”.

Feliĉe tio montras, ke Esperanto pli kaj

pli iĝas komparebla kun la modernaj lingvoj, en kiuj ankaŭ ne malestas tiu literatura aspekto. Ke tiu freŝa vento en Esperanto ankoraŭ estas tre eta, estas konstateble el la fakto, ke reeldono de la poemaro tiel komplike kaj nekutime okazis. La distanco, kiun faras la aŭtoro inter si kaj la verko per la pseŭdonimo Peneter estas tute komprenebla, same kiel scienculoj, kiuj kompilas en frivola momento dedektivromanon kaj subskribas tiun prozon ne per siaj universitataj titoloj, sed per simpla alia nomo. Tamen la ĝisosta mistifikado kiel ĝi ankoraŭ nun disvolviĝis espereble ne plu estos bezona por la sekvonta tria eldono de la ne plu „sekretaj” sonetoj.

E. Borsboom.

*) „LIBRO DE AMO” - poemaro de Peter Peneter kaj Georgo Peneter. Formato 13 x 20 cm, 264 paĝoj, bindita. La vendoprezio estas 4.60 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro, afrankite. Por eventuala registro estas eldonendaj 0, 20 dolaroj. Mendebla ĉe

S-ro William Auld,
20 Harviestoun Road,
DOLLAR, Clacks. Skotlando.

S-ro Fernando de DIEGO,
Apartado 1120,
SANTA CRUZ DE TENERIFE,
Kanariaj Insuloj.

F-ino Denise Bettman,
90 Faubourg St-Honoré,
PARIS 8, Francujo,
Poŝtĉekkonto 218 79 48 Paris.

S-ro Miyomoto Masao,
Nakacu-hamadoori 3-10,
Oojodo-ku OSAKA Japanio.

Ĉar La Amikoj de P. kaj G. Peneter nek disponas komercan aparaton, nek povas praktiki kutimaĵojn pri kreditoj, montranspagoj ktp., ricevos plenumon nur tiuj mendoj, kiujn akompanas samtempa pago.

„LA PENDOLO KIU KURACAS”, „LE PENDULE QUI GUÉRIT”, de Maurice LAVARENNE, eks-profesoro ĉe la Beletro Fakultato en Clermont-Ferrand, Francujo. Franclingve kun resumo en Esperanto. 160 p. Prezo: 8,40 francaj frankoj. Mendebla ĉe la aŭtoro, 66, rue Blatin poŝtĉekkonto 283 - 25, CLERMONT-FERRAND.

La verkinto, kiu instruadis dum kvindek jaroj, rimarkis, jam preskaŭ tuj ke la karaktero de liaj lernantoj dependas principe de ilia farto. Kaj tio tute nature alkondukis lin al la studado de diversaj metodoj medicinaj, ne tre konataj, sed kiuj ŝajnis al li tre efikaj, speciale homeopatio kaj naturismo, kiujn li jam priskribis en antaŭaj verkoj.

La nuna libro estas dediĉita al radiestezo, kaj pli speciale al teleradiestezo, kiu (laŭ la aŭtoro! Red. „N.E.”) ebligas analizi el malproksimo, ekzemple per nura tufeto da haroj, la sanstaton de ĉiuj organoj de iu persono, la mikrobojn kaj toksinojn, kiuj povas difekti liajn humorojn, liajn mankojn koncerne mineralojn kaj vitaminojn.

(El enkonduko de la aŭtoro mem).

RACIAJ DERIVOJ KAJ VERBUZO, de Emilo Gasse. Eld. de la aŭtoro, Bloc B, Place Th. Lefèvre, 83, HYÈRES, Francujo. 8 p., 13,5 x 21,5 cm., broŝ. Prezo 2,20 steloj.

Emilo Gasse proponas krei pli da ordo en nia vortderivo, kaj tiucele fiksas por la radikoj iliajn respektivajn vortkarakterojn. Nu, origine jam Zamenhof faris tion en sia U.V., kvankam ne en ĉiu kazo kontentige kaj konsekvence. Tamen, dum la evoluo la praktiko faris el la neregulaĵoj klaran regulon al kiu ni dum pluraj jardekoj kutimis. Intence rekrei novan ordon en la jam evoluinta sistemo ŝajnas al mi nedezirinda revolucia ago, kiun ni tamen ne bezonas timi, ĉar ĝi neniam havos sukceson.

Por multaj radikoj kiujn ni ĝis nun konsideris kiel verbajn, Gasse fiksas substantivan karakteron. Praktike tio kaŭzus embarasan ŝanĝon en la ĝisnuna aplikado de sufiksoj. La aŭtoro evidente ne konscias, ke tian abruptan ŝanĝon neniu akceptos. Kio al unu plaĉas, tio ĝenas alian. Kaj krome li ne atentis, ke la karakteroj de vortradikoj ne en ĉiu lingve estas egalaj.

En aparta ĉapitro la aŭtoro riskas movi sin sur la danĝera tereno de la landnoma reformo. Li ne estas la unua kiu tiutere fiaskos. Sur la lasta paĝo li prezentas la verban sistemon kun kunmetitaj verbo-

formoj. Nur tio estas plene kontentiga, ĉar senreforma!

Mi konjektas, ke lia eldono ne pruvigos tiom necesega kiel la aŭtoro asertas. Cetero, lia propra lingvouzo ne estas modela, stile kaj gramatike.

G. J. D.

Aperis la unua numero de „**Militrezisto**”, Esperantlingva eldono de la trimonata gazeto „War resistance” de la Internacio de Militrezistoj. Jarabono kostas 10 ŝ. (20 steloj). Adreso: Lansbury House, 88, Park Avenue, ENFIELD, Middx, Britujo.

MUZILO-KAJERO no 2, de Prof. H. Paruzel. Eld. MUZILO, Frederikstraat 2, Dordrecht, Ned. Prezo 4,50 gld. (18 steloj).

Kun komponaĵoj de i.a. Auber, Chopin, Ĉajkovski. Vidu krome N.E. de marto 1965, p. 27.

ESPERANTO - ŜLOSILOJ

estas la nomo de diverskoloraj malgrandaj libretoj, kiuj estis la ĉefaj bataliloj en la esperantista propaganda arsenalo. Ili estas konataj ankaŭ sub la stranga nomo „ĉefeĉ-ŝlosiloj”, ĉar la ideo eldoni ilin venis de la germandevena brita Esperanto-pioniro H. F. Höveler. Li uzis kiel pseŭdonimon la vorton Ĉefeĉ, do la anglan elparolon de la komencliteroj de sia nomo: HFH.

Lia ideo estis eldoni libretojn en ĉiu lingvo, per kiuj ĉiu homo povu kvazaŭ per ŝlosilo, kompreni la esperantan tekston, sen antaŭa studado de la lingvo. La unuan ŝlosilon li eldonis en 1905 kaj antaŭ la mondmilito en 1914 jam ekzistis ŝlosiloj en 18 diversaj lingvoj.

Höveler mortis en la aŭtuno de 1918, sed la Esperanto-movadoj zorgis pri la eldono de novaj ŝlosiloj laŭ difinitaj normoj kaj sistemo. En 1939 ili ekzistis en 37 lingvoj. Kvankam nuntempe oni ne tre vigle uzas la libretojn, ili antaŭe estis modestaj, sed bonegaj bataliloj por propagandi nian belan lingvon.

Se vi iam vidis tian libreton, vi miros pro la bonega ideo de s-ro Höveler!

SKRIBA KURSO POR LA E-DIPLOMO

en kunlaboro kun la

Leidse Onderwijs Instellingen

Informoj kaj aliĝiloj nur pere de nia sekretariino:

S-ino W. P. Lok-van Putten,
Brederodelaan 36,
Santpoort (Z.),
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

S. Carmiggelt.

REKLAMO

Mia amiko Frits estas desegnisto en reklamoficejo. La animo de tia junulo havas la aspekton de preme zonita virinjo, ĉar li devas laŭ ordono de unu (lia ĉefo) klopode fari tion, kio laŭ opinio de alia (la kliento) estas kapabla mallogi trian personon (vin).

Ŝafoj kun kvar piedoj ne kapablas je tio - ili havu minimume kvin. Ĉar estas kvazaŭ kartludi kun la „blindulo”, kio plej ofte rezultigas al io, kion neniu deziras esti generinta. La patroj plenigas ekstere tramojn, kafejojn kaj stratojn.

„O, o, tiu ĉefo mia!” Frits ofte kaŝvortumas kapskuante; kaj tiam sekvas ia tiurilata anekdoto.

„Vi ĉiam desegnas tiel strangajn personojn”, la ĉefo antaŭ nelonge rimarkigis al li, „mi ŝatas vidi normalajn virojn kaj virinojn en miaj reklamoj. Bonvole promenu kun mi sur la strato, tiam mi montros al vi, kion mi celas”.

Estis somero, do ili eksidis sur kafejteraso. Unue preterpasis viro kun kapo kiel miskolorigita strutovo.

„Ĉu tia persono?” demandis Frits.

„Ne, ne tiu”, diris la ĉefo.

Nun preterpasis viandrolaĵa ineto kun surkape roza tevarmigilo.

„Ĉu tiu ĉi estas sufiĉe normala?” demandis Frits.

„Ne, je Dio, ne!”

Surfestigita fagoto sur Chaplin-ŝuoj ŝovire alvenis.

„Ĉu li?” diris Frits.

„Ne, certe ne”.

Dum la tuta mateno ili senrezulte sidadis atendante unu normale aspektantan homon kaj finfine ili montris unu al la alia la preterpasantajjn strangulojn, eksplodante pro ridado.

„Mi tutcerte ĝojas, ke mi mem ne preterpasis”, mi aldiris, sed estas profunda travivaĵo.

Li sciis duan anekdoton. Unu tagon li ricevis ordonon desegni en facila, franca stilo, virinon, kiu servu kiel rigardkaptilo por reklamo de ŝtrumpoj el nilono.

„Nu, mi opiniis ĝin agrabla, libera tasko”, rakontis Frits, „do mi pensis, mi

desegnos ĝin laŭ modelo. Hejme, mi ne povas labori - vi scias, mi havas kvin infanojn - do mi iris vespere al Suze. Vi ja konas ŝin, ĉu ne? Ŝi estas la knabino kun la ruĝaj haroj, kun tiu mokema rideto. Nu, mi desegnigis ŝin per kreto, en tia neglito el punkto - la rezulto estis amuza”. La sekvantan tagon li prezentis ĝin al la estro. Tiu ĝin rigardis longtempe kaj enpense. Tiam li diris: „Bone, sed simple maleblas. La virino . . . tio ankoraŭ povas esti. Sed vi forviŝu la liton en la fono”.

„Tio ne estas lito!” protestis Frits. „Estas nur streketo!” „Estas lito, tre klare”, firme daŭrigis la ĉefo, „ŝanĝu ĝin”.

Kaj mia amiko kunportis la desegnaĵon hejmen, kaj tie eksidis por rigardi, kiel li provos kuraci ĝin. Pri la streketo li faris nenion. Tiu estis bone metita tie. Sed post longa pripensado li nur forstrekis la rideton de Suze kaj anstataŭe desegnigis alian kapon.

„Belege”, la estro elvokis la sekvantan tagon. „Vi mem vidas, foriginte la liton, vi nun plibonigis ĉion”.

Frits rigardis min triumfe.

„Kaj ĉu vi scias, de kiu estis la nova kapo?” li demandis.

„Ne”, mi diris.

„De mia edzino”, li respondis.

(EL: „Speciale por vi”)
Tradukis H. G.

* *
*

Nederlandaj poŝtmarkoj kun Esperanto-stampoj.

En la februara numero de „N.E.” ni presigis sur paĝo 20-a peton de Filatela Sekcio de Pola Esperanto - Asocio (Nowy Swiat 27, Warszawa, Polujo) pri alsendo de nederlandaj poŝtmarkoj kun Esperanto-stampoj. Ĉar eble inter niaj gelegantoj estas intereso por ĉi tiu temo - ankaŭ sekve de la bonega televida programo de la N.C.R.V. je la 9-a de januaro pri Esperanto-poŝtmarkoj - mi presigas ĉi sube liston de tiaj E.-stampoj, aperintaj en Nederlando. Mi trovis la liston en „La Glumark-Kolektanto”, oficiala organo de la Esperantaj Kolektanta Internacia Klubo”, 1964, n-ro 28 (adreso: S-ro Ivar Paulsson, Algatan 3, SOLNA 2, Svedujo).

H. G.

LA FABELO PRI ŜAKLUDO.

Eble vi konas la fabelon pri la eltrovinto de la ŝakludo? Oni rakontas, ke li deziris tre strangan rekompenco.

„Donu al mi,” li diris, „unu greneron por la unua kvadrato de la ŝaktabulo, du grenerojn por la dua, kvar por la tria, kaj tiel por ĉiu sekvanta kvadrato la duoblan kvanton!”

Granda rid-eksplozo estis la sekvo de lia stranga peto. Nur kelkaj greneroj . . . tio ja estis malgranda rekompenco!

Sed kiam oni kalkulas, kiom estas la sumo, oni vere miras. Mi ne kalkulis tre precize, sed tamen mi povas diri ke la nombro estas pli ol 185 kun dek sep nuloj!

La dezirinta rekompenco superas la rikolton de la tuta tero dum multaj jaroj . . . Kaj nun . . .

Ĉu vi jam varbis novan esperantiston? Tio estas malfacila tasko. Sed eble vi sukcesos unufoje en la tuta jaro.

Aŭ ĉu mi deziras tro multe de vi?

Nu, tiam vi povas klopodi varbi nur UNU novan esperantiston dum du jaroj. Tio ja ne estas tro multe! Sed . . . se ni ĉiuj faras tion, ni povas nombri la nederlandajn esperantistojn per milionoj jam post dudek jaroj.

Kaj nun, ne plendu ke mi fantazias!

Nur zorgu, ke vi varbu duonan esperantiston dum la tuta jaro.

Ankaŭ mi klopodos, do ni jam duope laboras!

Kaj la aliaj esperantistoj . . . ? Tion mi ne scias. Ĉar kiam mi laboras mi ne havas tempon por kontroli kaj kritiki aliulojn.

Adiaŭ, amikoj! Kaj prosperan laboron!

RADIO NEW ZEALAND DISAŬDIGAS PER ESPERANTO.

Kiel kontribuo por la Jaro de Internacia Kunlaboro, Radio New Zealand komencis disaŭdigi per Esperanto, dekminutan programon kun internacie interesa novaĵo. Oni elsendas la programon je la lasta ĵaŭdo de ĉiu monato.

Ĉar la sendilo havas nur malgrandan povon oni ne povos aŭdi ĝin ĉie, sed Radio New Zealand bonvenigas korespondadon, Esperantan aŭ anglan, kaj alte taksas komentojn pri programoj. La inĝenieroj ĉiam interesigas pri raportoj pri ricevo, de transmaraj landoj. Oni respondas al ĉiu raporto per letero aŭ per QSL karto.

Raportoj de aŭskultintoj enhavu la ondlongon aŭ la frekvencon de la elsendo, la daton, horon, iom da programa detalo kaj komentojn pri interfero, se tio okazis. Radio New Zealand jam disaŭdigas en la lingvoj de tri pacifikaj insuloj; Samoa, Raratonga kaj Niue.

Tiu ĉi programo estas eksperimenta; ĝia daŭrado dependas de viaj respondaj leteroj, kiujn vi sendu al:

Radio New Zealand,
New Zealand Broadcasting Corporation,
P.O. Box 2396,
Wellington, C. 1, NOV-ZELANDO.

Dum la lasta ĵaŭdo de ĉiu monato:

0830 GMT, kaj 1130 GMT,
ZL2, 9.54 Mc/, 31.45 metroj, en la 31-metran gamon.
ZL7, 6.08 Mc/s, 49.34 metroj, en la 49-metran gamon.

NEDERLANDO.

1. Amsterdam	1931	2-7.8	SAT-Kongreso	(Viola) 32 mm
2. 's-Gravenhage	1936	11-13.4	25-jara Jubilea Kongr.	(Viola) 34 mm
3. Hago	1937	1-6.8	XIX-a Kongr. IKUE Kvarlinia teksto	
4. Arnhem	1937-1938-1939		Esperanto-Domo	(Viola)
5. Amsterdam	1940	24-25.3	Jubilea Esp. Kongr. Pasko	37 mm
6. Heerlen	1947	6-7.4	28-a Kongr. de F.L.E.	40 mm
7. Amsterdam	1948	31.7-5.8	31-a Kongr. SAT	Nigra inko 32 mm Viola inko 32 mm
8. Amsterdam	1951	Sen dato	Jubilea Kongr. FLE Viola	37 mm
9. Haarlem	1954	31.7-7.8	39 U.K.	
10. Amsterdam	1962	sept.	Esperanto 75 jaar Internationale Taal	
11. 's-Gravenhage	1962	sept.	Esperanto 75 jaar Internationale Taal	
12. Haarlem-Station	1962	sept.	Esperanto 75 jaar Internationale Taal	
13. Rotterdam	1962	sept.	Esperanto 75 jaar Internationale Taal	

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Pres.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.

Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuigo.

Libroservo: Borniastraat 95, Leeuwarden. Poŝtĝirkonto 7 69 15.

Gazetarservo: Frederikslaan 47, Schoorl (N.-H.).

Anoncoj: Anonctarifoj laŭ peto haveblaj ĉe la kasistino.

Informa Fakto: S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem.

Biblioteko: S-ro J. R. Janssen, Veen en Duin 15, Bloemendaal.

Tel.: 0 25 00 - 5 11 20.

KONCIZE

Voĉpöndado. En Britujo ekzistas asocio de „Britaj Esperanto-Sonbendamikoj” (British Esperanto Tapefriends). Kiu deziras korespondi per sonbendoj estas petata direkti sin al la klubo, adreso: „Hazelwood”, Langshott, HORLEY, Surrey, Britujo.

Kiu samidean(in)o sendis al Esperanto-klubo „Ora Fulmo” en SOSNOVIEC, Pollando, okaze de letervespero, bildkarton montrantan belajn tulipojn ruĝajn inter kiuj ĉarma nederlanda fraŭlino?

Tiu samidean(in)o afable estas petata kiel eble plej baldaŭ kontaktiĝi kun s-ro J. Telling, delegito de U.E.A., Middelrode 91, ROTTERDAM-23.

„FIAT”-filmo en Esperanto. La Fiat-kompanio produktis filmon (8 x 16 mm) kun sono en Esperanto pri la lasta Fiat-aŭtomobilo „850”. Estas kolorfilmo, kiu daŭras ĉ. 25 minutojn. Sekcio kiu interesiĝas, bonvolu anonci sin ĉe nia sekreta-riino, s-ino Lok-van Putten.

UNESKO-ELDONAĴO INDIKAS PLI-VIGLIGON DE MONDA ELDONADO

Ĉirkaŭ 375.000 libroj aŭ broŝuroj aperis en la tuta mondo dum 1961, laŭ la ĵus eldonita *Statistika Jarlibro* de Unesko.

Tiu nombro, bazita sur informoj el 70 landoj de kvin kontinentoj, estas notinde pli granda ol en antaŭaj jaroj: 360.000 en 1960 kaj 335.000 en 1959.

La monda eldona agado dividiĝas jen: 44% en Eŭropo, 22,9% en Azio, 19,7%

en Sovetunio, 6,9% en Nordameriko, 4% en Sudameriko, 1,6% en Afriko kaj 0,8% en Oceanio.

Kiel klarigas la *Statistika Jarlibro*, temas nur pri proksimumaj ciferoj, ĉar diversaj landoj uzas malsamajn difinojn (iuj en-kalkulas oficialajn eldonaĵojn, muzikaĵojn kaj universitatajn disertaciojn).

Plej multajn verkojn (74.000) eldonis en 1961 Sovetunio (tre diverslingva lando, kiu ofte eldonas saman verkon en pluraj lingvoj). Sekvas la Unuigita Reĝlando per 25.000 titoloj, Japanujo (24.200), la Federacia Respubliko Germanujo (22.000), Usono (18.000) kaj Francujo (12.700). (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

TURISMO.

Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio aranĝas de 2 ĝis 15 okt. 1965 en montara ripozloko MIEDZYGORZE (Sudeta Montaro)

Internacian Esperantistan Ferion. Inf. hav. ĉe Pola Esperanto Asocio, Okcidenta Regiono, Turisma Fakto, str. Bubojs 3, WROCLAW, Polujo.

Montara Esperanto-Somerumejo. Bela Palanka, turisma loko apud Niš, en Serbio, je 1600 m. super la marnivelo, fariĝis malmultekosta, internacia Esperanto-somerumejo. En ĝi funkcias hotelo „Esperanto”. Informoj ĉe: Rakic Najdan, Lj. Randjelovica 21, BELA PALANKA, Jugoslavio.